2-a Jaro, N-o 9 (61)

APERAS S.A.T. SEMAJNE

26. Novembro 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Korespond-adreso: "Redakcio de Sennaciulo", Colmstr. 1, Leipzig-Stö. (Germ.) | Gvidanto: Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX | Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Proletaj Pioniroj †

Popolkomisaro Frunse

Naskiĝis en la jaro 1885 en Piŝpek (Turkestano) kiel filo de kamparana familio. En la jaro 1901, kiam li vizitis teknikan altlernejon en Petersburgo, li aliĝis al la bolŝevika frakcio de l' socialdemokratio kaj estis elpelita el P. — 1905 li partoprenis la decembran ribelon en Moskvo, kaj 1906 la rusa socialdemokratio delegis lin al Stockholm-a partitago. Poste li laboris en teksfabrikejo en Ivanovo-Voznesensk, tie oni arestis lin kaj kondamnis lin dufoje al morto pro organizo de soc.-dem. unuiĝo kaj pro rezisto kontraŭ la polico. La puno estis ŝanĝata en 10-jaran malliberigon. En la jaro 1915 li sukcesis forkuri. Li laboris poste en la cara armeo por fondi revoluciajn organizaĵojn.

Post la februara revolucio li partoprenis kiel gvidanto de la sovetoj en Blankrusio la batalon kontraŭ Kornilov. Post la oktobra revolucio oni elektis lin kiel prezidanton de la gubernia ekzekutivo en Ivanovo-Voznesensk. Li komandis ĉe la sudorienta fronto 4 armeojn, kiuj rebatis la Kolĉak-armeon, plue li estis komandanto ĉe la turkestana fronto kaj kiel komandanto de la sudfronto kontraŭ Vrangel li estis direktanto de gravaj militagoj. De la jaro 1920—1924 li estris la militpotencon en Ukrainio kaj Krimeo. — 1924 li estis nomata anstataŭanto de Trotzki kaj en januaro 1925 kiel popolkomisaro por militaferoj.

La mortkaŭzoj estis korparalizo, kiu estiĝis post operacio de stomako kaj intesto. Oni entreprenis la operacion por forigi simptomojn, kiuj jam montriĝis antaŭ 10 jaroj en malliberejo post farita, malprosperita operacio de apendico. Malgraŭ la kora malforto, kiu evidentiĝis dum la operacio, la kuracistoj esperis, ke Frunse resaniĝos, tamen baldaŭ estiĝis grava malboniĝo en la stato de la paciento. Do, li mortis en la nokto de 31. okt.

Per la morto de Frunse la sovetia registaro perdis unu el siaj plej bonaj organizantoj kaj gvidantoj. Granda funebro regas ankaŭ inter la popolo. Multaj kondolenc-manifestacioj kaj deputacioj alvenis en Moskvo por lastfoje honori la mortinton. Tuj kiam publikiĝis la sciigo pri la morto de Frunse, domoj kovriĝas per ruĝaj duonmaste hisitaj flagoj. Ĉiuj teatroj kaj amuzejoj en ĉiuj sovetiaj respublikoj estis fermataj.

Hermann Greulich

Paĉjo Greulich, nia "maljunulo", la antaŭbatalanto de la socialismo en Svisio, la vekanto de la laborista klaso de nia lando, ne estas plu. 84-jara li nin forlasis la 8. nov. Li estis unu el la rondo tre frue ariĝinta ĉirkaŭ Marx kaj Engels, kune kun W. Liebknecht, Bebel, Keir Hardie, V. Adler kaj multaj aliaj, kiuj jam de longe estas ŝiritaj for de tiuj, por kiuj ili luktadis.

Hermann Greulich naskiĝis la 9. aprilo 1842 en Breslau. Kiel infano de malriĉaj gepatroj li jam frue eksentis la maldolĉaĵojn de laborista vivo. Vizitinte la popollernejon li fariĝis bindisto. 1865 j. li vojaĝis Svision. Tiam la 23-jara junulo ne pensis pri la rolo, kiun ludi li estis vokita. Baldaŭ li rekonis la gravecon de la sindikataj organizaĵoj kaj fariĝis ties pioniro. 1869 j. li fondis la unuan laboristan gazeton en Svisio, la "Tagwacht" en Zürich, kies redaktisto li estis ĝis 1880 j. Post fondo de la svisa laborista sekretariejo li fariĝis ties estro kaj restis tia ĝis lia vivfino. Senlace li laboris kaj estis unu el la plej eminentaj propagandistoj por la laŭleĝa protekto de la laboristaro. Sed tiu perleĝa laboro ne malhelpis lin ekkoni la ĉiaman verecon de la kom. manifesto: "La liberiĝo de la lab. klaso povas esti nur la produkto de la lab. klaso mem."

Lia agitado por la sindikataj organizaĵoj estis senlaca kaj kvankam politikisto ni devas konsideri lin kiel patron de la sindikalismo en Svisio. Membro de urba kaj kantona konsilantaro li estis jam de 1890. Li estis elektita en 1902 j. kiel deputato al la "nacia Konsilantaro" (parlamento). Escepte interrompon de 1905—08 li restis parlamentano ĝis sia morto. Ankoraŭ antaŭ 2 semajnoj la Zürich-a popolo reelektis lin deputaton per la plej granda voĉnombro. — Vivo, riĉa je laboro kaj penado, sed ankaŭ riĉa je sukcesoj, estas estingita. Paĉjo Greulich havis ankoraŭ la plezuron vidi la kreskadon de planto, kies semon li metis en la teron. La svisa sindikata federacio nombras pli ol 150000 membrojn kaj la soc. parlamentfrakcio nombras 49 el 198 entute, kiuj sin apogas sur 210000 voĉdonantoj. — Antaŭ via tombo kliniĝas ne nur la tuta svisa proletaro, sed ankaŭ tutmonda. Via vivo plena de sindonemo estu ekzemplo por ni! *K. D.* 3477

Honoron al ilia memoro!

Kun la germana delegacio laborista al Sovetlando!

VI.

La vojaĝo al Kaŭkazio

En delegacia kunveno ni ĉiuj interkonsentis, dividi la delegacion en tri partoj, por ke ni havu pli grandan eblecon vidi la veran staton de la lando. Triono de ni elektis la Uralon kiel studkampon, alia parto intencis veturi en Ukrajnion kaj Krimeon, la lasta triono, en kiu mi partoprenis vojaĝis en la regionojn inter la nigra kaj kaspia maroj. Tie estas la lando Georgio, la objekto de plej akra disputo inter la laboristaj partioj en la tuta mondo. Tiu-ĉi lando ankaŭ estis la ĉefa kaŭzo, kial multaj socialdemokratoj partoprenis la vojaĝon.

Estis la 25a de julio. La haloj de la stacidomo estis plenigitaj de gelaboristoj, kiuj venis doni al ni siajn dezirojn por nia plua vojaĝo. Ĉirkaŭ la dua la vagonaro forlasis la stacion, malrapide ĝi ŝoviĝis sur la relaro antaŭen en la longajn antaŭurbojn de la rusa metropolo, ĝis fine ankaŭ la lastaj domoj malaperis, kaj ĝi rapidis tra senfinaj ebenaĵoj. Vastaj kampoj plantitaj per la plej diversaj kampofruktoj esperigas bonan rikolton post la longaj, teruraj jaroj de malsato. Tie ĉi kaj tie miksiĝis en la paca pejzaĝo la malriĉaj vilaĝoj de la rusaj kamparanoj. La per pajlo kovritaj domaĉoj rakontas pri la mizerego, kiu akompanis ilin tra la fluo de jarcentoj. Tamen ofte superstaris ilin domoj kun tegelaj tegmentoj, kvazaŭ simbolo de nova epoko.

Plue rapidegas nia vagonaro, senlace al la malproksima celo. Dekstre kaj maldekstre de la vagonaro sur la relejo mi observis bonan staton de veturvojo. La rusaj fervojaj kamaradoj povas akcepti mian komplimenton, kiun mi povas doni kiel fakulo. En la pli grandaj urboj kie ni haltis, montris la alkurinta proletaro ĝian ĝojon pro nia veno. Sed nur kelkajn minutojn daŭris la reciprokaj salutoj, tuj ni ree veturis kaj malfrue en la nokto ni atingis post 32 hora veturado Rostov apud Don.

En Rostov

Kvankam la horloĝa montrilo anoncis la dekunuan horon, estis ankoraŭ tre varme. Interne de la stacidomo kaj ekstere sur la placo staris en densaj amasoj la Rostovaj proletoj atendante nian alvenon. Post mallonga entuziasma mitingo, ni kune kun la lokaj sindikataj reprezentantoj fiksis nian laborplanon por la venonta tago. Laŭ tio ni vizitis kelkajn fabrikojn, inter ili la ĉefmetiejo kaj cigared-produktejo. Krom tio, ke ni povas konstati ankaŭ ĉi-tion, kion ni jam iufoje en Leningrad kaj Moskvo trovis, nome okhoran labortagon, ruĝan direktoron, uzinkonsilantaron, murgazeton ktp., ni vidis, ke la produktaĵo kreskas de monato al monato. La salajro de la laboristoj estis kiel ĉie same alta por ambaŭ seksoj: Viroj kaj virinoj gajnas je la sama okupado la saman monsumon, kion oni en Germanio ne povas trovi. En la cigared-fabriko ankaŭ troviĝis malsanulejo por pulmomalsanaj gelaboristoj, kie ili estas, ĝis kiam estas eble transporti la malsanulojn al montaraj kuraclokoj en Kaŭkazo kaj Krimeo. Aliaj sociaj institucioj kiel manĝsalono, klubdomo, bibliotekoj perfektigis la bonan impreson de la inspektitaj uzinoj.

La studado de la fabrikoj kostis al ni multegon da ŝvito, ĉar en Rostov la varmego preskaŭ ne estis tolerebla. Des pli ni interkonsentis veturi la venontan tagon al la urbeto Taganrog, kiu estas lokita apud la bordo de la Asova maro. Tie ni intencis iri en la fabrikojn al niaj laborantaj k-doj kaj ekzameni la situacion de ili en ĉiu rilato.

Ĉirkaŭ la sepa matene ni enŝipiĝis, la suno jam ree memorigis al ni, ke ni ne estis plu en Germanio. La vigla vivo en la stratoj de Rostov montris, ke ankaŭ la enloĝantaro preferas laŭ ebleco fari la laboron dum la matenaj kaj vesperaj horoj, kiam la varmego ne estas tiel premiga kiel tagmeze. En la hela sunlumo ni vidis la signojn el la revoluciaj bataloj, kaj ilia multnombreco manifestis, ke la bataloj inter la blankuloj kaj ruĝuloj devis esti estintaj tre akraj. Sed ĉiuloke diligentaj manoj riparas kaj plibonigas la aspekton, baldaŭ malaperos la lastaj restaĵoj de la sanga tempo. Sur la rivero Don viciĝas grandaj kaj etaj boatoj de la fiŝkaptistoj en senfina nombro, rakontante, ke unu el la ĉef-profesio de la enloĝantaro estas la fiŝkaptado. Jen kaj jen superstaras ilin vaporŝipoj el fremdaj landoj.

Post kvarhora veturado eliĝis el la maro la turoj de preĝejoj de Taganrog, kaj baldaŭ kun pli aŭ malpli spritaj rimarkoj flanke de la delegitoj la ŝipo albordiĝis en la haveno. Laborista muzikistaro salutis nin per la sonoj de la "Internacionalo". Pluvis. Ŝajnis al mi, ke ĉi-tie la soveta registaro ne havas tiom da influo, ĉar ĝi ne povis malhelpi la malagrablan veteron, ŝajnis, ke la brako de la "Ĉeka" ne povas atingi Petron en la ĉielo. Malgraŭ tio ni rapide alvenis en la diversaj uzinoj. Kion ni vidis kaj kien ni pluvojaĝis mi raportos venontan fojon. Por hodiaŭ: Ĝis revido!

(Daŭrigota) *Willi Bennewitz* 2378

Senlaboreco

Nuntempe senlaboreco estas la ĉiama akompananto de milionoj da laboristoj. Ĝia ombro etendiĝas al ĉiuj landoj, al kiuj la kulturo, la kapitalismo kaj kun tio la tekniko enpenetris. Oni ne povas paroli pri krizo, sed oni certe povas diri, ke la senlaboreco ankoraŭ pli fortiĝos. Pri la kaŭzo de ĉi tiu mizera afero, la opinioj estas tre diversaj. En Germanio la gazetoj skribas: Ni devas pagi tro multe da militŝuldoj kaj pro tio mankas la kredito por la industrio! Kaj niaj laboristoj ne sufiĉe longe kaj intense laboras. En Francio, Anglio kaj en la aliaj venklandoj oni diras: La Germanoj superŝutas nin per malkaraj produktaĵoj kaj la germanaj laboristoj tro malkare kaj dek ĝis dekdu horojn laboras potage. Sed tio ĉio ne estas la vera kaŭzo. La vera kaŭzo estas la teknika progreso, kiu kaŭzas, ke la homaro pli produktas ol ĝi sub kapitalisma sistemo povas konsumi. Ĉar mil milionoj de la tera loĝantaro ne tion ricevas, kion ili povas pretendi. Do la tekniko plu progresos, kaj ĝi ankoraŭ malfermas grandajn perspektivojn, kiuj faras multajn laboristojn superfluaj, nur ankoraŭ bonaj kiel strikrompantoj. Ekzemple en nia urbo Solingen, kiu ja estas famkonata pro la ŝtalaĵproduktado (tranĉiloj ktp.) ekzistas ĉiam kelkcent senlaboruloj. Nun la grandaj ŝtalaĵfabrikoj konstruas novajn laborejojn, sed ne por la senlaboruloj, sed por la hejmlaboristoj, kiuj jam de kelkcent jaroj hejme laboras, multaj ankoraŭ nun per tre primitivaj rimedoj kaj iloj. Volonte aŭ ne volonte ili nun devas labori en la tielnomataj kaĝoj laŭ modernaj metodoj. El tio rezultiĝas denove superfluaj laborfortoj, kiuj, se ili ne estas klaskonsciaj, danĝere minacas la laborantajn proletojn. Ni ankaŭ ne povas kaj ne volas haltigi la progreson. Nuntempe la laboristaro ne plu estas tiel malsaĝa, kiel niaj praprapatroj, kiuj 1848 ĉi tie detruis la unuajn tondilfandejojn ĝisteren (antaŭe ili forĝis la tondilojn), ĉar ili timis ne plu ricevi laboron. Ni klaskonsciaj laboristoj salutas la teknikan progreson kaj nia tasko estas eduki la proletaron al internacia kaj sennacieca pensmaniero, por ke ĝi ekkonu la valoron de la progreso, se ĝi estas servema al la subprematoj de la tuta mondo. Do, en tiu senco ni laboru. La tekniko kunlaboras kaj rapidigas nian aferon. *F. Palm. 3992*

Burĝa juĝistaro de Polio

Kamaradoj! Vi certe rememoras la artikolon en "Sennaciulo" pri la fi-agado de pola policista provokisto Trojanovski, kiu laŭ sekreta ordono de la Varsovia t. n. "Defensivo" (antaŭe la carista "Ochrana") enŝteliĝis en la redakcion de la kampanarlaborista gazeto "Valka Ludu" ("Batalo de l' Popolo"), por spioni la radikalan popol-movadon kaj ties gvidantojn. Kiel respondeca redaktoro de ĉi-organo li aperigis ŝajne tre revoluciajn artikolojn, ke eĉ ni ĉiuj-simpluloj miris, ke en niaj malliberaj cirkonstancoj oni permesas tiel revolucie skribi. Sed devis baldaŭ klariĝi la enigmo: La tagon antaŭ la 1. majo k. j. eksplodis bombo en la redakcio de "V. L.". La alveninta simpla stratgardista policistaro trovas vunditan "redaktoron" Trojanovski en la redaktejo kaj per ilia "nelerta" agado la sekreto malkovriĝis baldaŭ antaŭ la civila publiko — ke jen, s-ro Tr. ne estas redaktoro, sed agento de politika policistaro, kiu je ĝia ordono preparis bombon por provoki la tutan radikalan movadon de "V. L." kiel "bolŝevikan atencomovadon". La vero alvenis al la publiko. Trojanovski komence konfesis sian fi-rolon; poste intervenciis la sinjoroj de la "Ochrana",

liaj ĉefoj — kaj — li neis ĉion. Vidante, ke tamen la pozicio por la policistaro estas perdita, ke neniu plu je lia purintenco kredas kaj ke sekve la "Ochrana" aparato estas entute kompromitita — nia juĝistaro venas helpeme al la kompromitita policistaro: Oni starigas *veran* (aŭdu!) *proceson* kontraŭ Trojanovski kiel respondeca redaktoro pro liaj artikoloj revoluciaj kaj jen — kia estas la historio de ĉi-proceso, okazinta sabate, la 24. oktobro 1925 en la distrikt-juĝejo de Varsovio. Ni tradukas nur la tekston de burĝa strat-gazetaro:

"Trojanovski konfesis hieraŭ publike en la juĝejo, ke li estis dungito de la politika policistaro kiel t. n. konfidento — provokisto. — Jam ĉe la komenco de proceso advokato Ŝumanski ekpostulis kiel atestantojn la superkomisaron policistan Leski kaj la esplorjuĝiston Luxemburg, kiuj *devas konstati la veron kaj konfesi, ke la revoluciema "Valka Ludu" estis eldonata per la politika juĝistaro,* je kies servoj troviĝis Trojanovski."

Laŭ propono de prokuroro la juĝistoj ne akceptis la postulon de l' advokato, pro kio la advokato Ŝumanski *demonstracie forlasis la defend-tablon* kaj deklaris: Ĉar oni malebligas al mi la malkovron de la fakta vero, mi rezignas je la defendo.

Post la juĝo-proceduro la juĝisto donis voĉon al la akuzito. Li deklaris:

"Mi devas kategorie*) deklari, ke *mi estas konfidento de politika policistaro.* Mi eldonadis la gazeton "Valka Ludu" je ordono de la polico. La superkomisaro L. scias tion tre bone. La plej bona pruvo de tio-ĉi estas, ke post konfisko de la 4. n-ro de "V. L.". la superkomisaro L. intervenciis ĉe la registar-komisaro (prefekto) de Varsovio, por ke oni permesu al mi la pluan eldonadon de l' gazeto. Mi ankaŭ ne volas kaŝi tion, ke *mi preparis la bombon ankaŭ je ordono de polico. Per ĝia eksplodo mi perdis la okulon kaj* la korpo-sanon. *Kaj kion mi havas por tio?* — Se mi dum la esploro neis la kunlaboradon kun la polico, ĝi estis pro tio, ĉar mi pensis, ke *mia estraro scipovos defendi min kaj direkti la aferon tiamaniere, ke mi nenion risku.*

Okazis la malo. Mi ne havas motivon por kaŝi la veron. Mi petas je liberigo ĉar mi agis laŭ ordono de polica estraro." "La vortoj de juĝito impresis tre la publikon" — aldonas la burĝa gazetaĉo. Kaj la fino? — — —

"Post mallonga interkonsento la juĝistaro kondamnis Trojanovski je *1 jaro de akra malliberejo.*" Pro kio? Pro la revoluciema artikolo? Pro la bombo-preparado? Ne! Pro la mallerteco lia, pro tio, ke li — fiaĉulo — ne volis ĝismorte fidele servi al la provokista estraro sia kaj, kiam doloregis al li la vundoj kaŭzitaj ĉe l' eksplodo, li decidiĝis doni la veron!

Kaj nun pripensu, kamaradoj tutmondaj, la senhontecon de nia registaro, policistaro kaj juĝistaro entute! Oni ne hontas fari komedion kaj akuzi *sian propran provokiston* pro la agoj faritaj laŭ registara fia ordono.

Oni ĉe ni ne hontas nomi la landon demokrata republiko, havanta ŝajne sian tre progresivan konstitucion, kaj samtempe juĝi laŭ la carista despota pun-kodo kontraŭ-konstitucia ĉiujn progresemulojn. Oni ne hontas retenadi la plej abomenan institucion de la carista absoluta regado, la "Ochranon", nun nomitan "Defensivo". Kaj pagi milionojn el la poŝoj de loĝantaro por policist-spionoj! — Sed — ĉu vi pensas, ke la skandal-afero Trojanovski estas nur la sola? Samtempe okazis en Vilna la juĝo kontraŭ la policisto Muraŝko, kiu mortpafis la du revoluciulojn polajn — Wieĉonkieviĉ kaj Baginski, dum ili estis transportitaj en vagonaro ŝanĝvoje al Rusio. Kiu ĉe ni ne scias, ke Muraŝko ne agis memvole, sed laŭ sekreta ordono de registaraj sferoj! Tamen oni daŭras la hipokritecon, faras ŝajn-proceson kontraŭ Muraŝko, por povi deklari al la ekmovita Eŭropo: jen, kiaj ni estas justaj — kaj — oni kondamnas la kaŝ-mortigiston je *2 jaroj da malliberejo* — tio signifas po 1 jaro pro 1 mortigito. —

Sed la memdefendintajn sin revoluciulojn Hübner, Kniezski kaj Rutkozski oni mortpafas, la junajn heroojn Botvin kaj Engel, kiuj mortigas similajn provokistojn kiel Trojanovski, (estinta Komunisto) — oni mortpafas — la oficiale ŝanĝotajn Wieĉonkieviĉ kaj Baginski oni pere la Muraŝkoj mortpafas! — — — Jen la justeco ĉe ni, jen la ŝtata leĝo-ordo!

Oni ne bezonas esti komunisto, oni bezonas nur esti simpla sincera konstituciulo, simpla laboranto, por senti profundan honton pro ĉio-ĉi. Tia estas mi — skribanto de ĉi-linioj, kaj ĉar ne ekzistas ĉe ni ia ajn vort-libero, ĉar oni ne permesas ne nur krii, sed eĉ plendi, mi do laŭtvoĉe vokas al vi, kamaradoj tutmondaj!: Levigu pri tiu fi-agado de nia senhonta burĝaro la tutan revolucian ĉu socialistan ĉu komunistan ĉu anarkistan kaj sindikalistan gazetaron vialandan, por ke almenaŭ tiavoje estu farata la honoro de nia lando, ke troviĝas unu almenaŭ, kiu protestas kontraŭ ĉiuj-ĉi senhontaĵoj.

Hontiĝanta Polo.

*) Decide.

Provizaĵtaĉmento de l' Proletaro

La 7. kaj 8. novembro okazis en Halle (Mezgermanio) la 1. regna kongreso de I. L. H (Internac. Lab. Helpo). Antaŭ 4 jaroj ekzistis landkomitatoj, nur pli aŭ malpli interligitaj. Hodiaŭ la okazo de la 1. kongreso evidente montras, ke I. L. H. fariĝis potencfaktoro grava de la laboristaro, portata sur ties ŝultroj. Malgraŭ ĉiuj malhelpaĵoj la marŝo antaŭen de I. L. H. ne estis haltigebla. Multaj laboristorganzaĵoj kolektive aliĝis al ĝi. Post intencata kolektivaliĝo de la anglaj kaj ĉinaj sindikatoj, I. L. H. fariĝos la plej granda kaj plej forta internacia organizaĵo, havante pli ol 30 milionoj da gemembroj. Kaj konsideru ĝuste; ĉi tiu organizaĵo evoluis el la landkomitatoj kiuj 1921 estis fonditaj por helpi Rusion, kaj kiuj poste devis likvidiĝi. Ke tio ne okazis, pruvas, ke I. L. H. ne estas aranĝaĵo de iu partio, inverse pruvas, ke ĝi vere naskiĝis el la nepra neceseco kiel superpartia organizaĵo; ĉar montriĝis, ke la ekzistantaj politikaj kaj sindikataj unuiĝoj ne sufiĉas, helpe subteni laboristojn dum pli grandaj mizerperiodoj. Pripensu, postmilite okazis grandskalaj ekonomiaj bataloj, ke eĉ la plej granda laboristunuiĝo sola ne povis subvencii ilin. Rememoru, la strikojn de la ministoj en Ruhrteritorio kaj Silezio. Plu la naturkatastrofoj en Japanio kaj Rusio.

Nun la kongreso. Alveninte en Halle ne forgesebla bildo. Antaŭ la stacidomo multege da policanoj, inter ili 20 rajdantoj. Kaj kial? Laboristoj kaj ruĝaj frontbatalantoj amase estis aperintaj por akcepti la alvenintajn eksterlandajn k-dojn. Tiu fakto verŝajne furiozigis la cerbon de la prusa policestro en Halle. Pro lia zorgo la I. L. H. havis grandiozan kaj propagandigan enmarŝon.

Je pinto de la demonstracio 10 rajdantoj, post ili la ruĝaj frontbatalantoj, poste denove 10 rajdantoj. sekvis nun anoj de la junularo, kiuj estis akompanitaj de piedirantaj policistoj.

La kongreso estis malfermita sabaton vespere. Dum ĉi tiu vespero nur estis raportoj. La ĉefa tago estis la dimanĉo, kiu kreis pli firman fundamenton en organiza rilato.

Enirinte la salonon, en kiu okazis la kongreso, bedaŭrinda fakto elokvente trudis sin al oni, nome da lingva diverseco, des pli, ĉar ĝi jam povus esti forigita, jam mondlingvo helpa ja ekzistas. La saman senton oni spertis dum la publika kunveno, kiu okazis dimanĉon antaŭtagmeze inter la 11a kaj 1a horo.

Parolis svisa, belga, angla kaj aŭstra k-doj. La tuta bonega aranĝaĵo treege efikis sur la Halle-aj laboristoj.

Post la kunveno la kongreslaboroj estis daŭrigitaj, ĉefe oni diskutis la estontan statuton. Fino de la kongreso dimanĉon vespere je la 7a.

Ĝia ekstrakto: Labori, laboregi por kiel eble plej ankrigi en la cerboj laboristaj la ideon de I. L. H. Batali por la atingo de la sindikata unueco. Marŝu la I. L. H., vivu la internacia proletara solidareco kiu helpas liberigi la mondon. *Voko.*

Hitler ĵetita per ŝtonoj

En Braunschweig (Germanio) okazis publika kunveno de la faŝistoj, en kiu devis paroli la gvidanto de la germana faŝista movado *Hitler.* La plej multo de la kunvenintoj akceptis Hitler per protestvokoj kaj li ne povis fini sian paroladon. Kiam li per aŭtomobilo forlasis la kunvenejon, la ribelanta homamaso ĵetis lin per ŝtonoj. Kvankam Braunschweig estas reakcia urbeto, tamen ankaŭ tie la famekonata Hitler estas ĝenita.

Industrialismo penetras Orienten

Militarismo, kiel fantoma nubo, pendas super Hindio. Envenis la blankuloj de Okcidento kun pafilegoj kaj militaj tankoj por subpremi la nigrulojn de Orienta Hindio. Tion la indiĝenoj ne ŝatas kaj protestas laŭpove. En antaŭaj jaroj, kvankam la lando suferis pro nesufiĉa rikolto kaj pestoj, kiel terkultura lando, tamen la indiĝenoj multe pli preferas tian kun ĝiaj malhelpaĵoj, ol la novan civilizon enkondukita el la malproksima okcidento, kun ĝiaj fabrikejoj, en kiuj ili devas labori 60 horojn ĉiusemajne, — ili, iliaj edzinoj kaj iliaj infanoj, por ricevi salajron nesufiĉan eĉ por la malmultaj bezonoj iliaj.

Ribeli li ne povas, ĉar la fremduloj estas tro fortaj por li. Lia gento estas multnombra sed nombro signifas nenion kontraŭ maŝinpafilegoj.

Kiel statas en Hindio hodiaŭ.

Pli ol 3 cent milionoj da loĝantoj, el kiuj la plejparto gajnas sian vivrimedon rekte de la terkulturo. En procentoj 72,98 terkulturas, 10,49 industrias. 5,73 en metioj 137 transportoj, 1,59 en la klerigaj profesioj, 1,53 en registara ofico, 1,45 doma servo.

La plej granda parto de Hindoj ankoraŭ vivas per primitiva kamplaboro en multaj vilaĝoj.

Multfoje pro nealloga vetero dum la sezono la rikolto ne maturiĝas kaj la vilaĝano devas iri al la avara pruntisto de mono por malgranda pruntopreno ĝis la alveno de la venonta rikoltsezono. Tiumaniere la plejmulto de la kamparanoj falas sub la suĉiloj de la pruntisto por kiu ili devas estonte laboradi dum sia tuta vivo.

La lando iĝas la posedaĵo de iu, kiu ne kulturas ĝin.

Prefere ol iri en la urbegojn por ekspluate labori dum longaj horoj en malsanigaj fabrikejoj, ili preferas resti hejme.

Regresa movado okazas, "Retroiro al la patrina tero". Same kiel en okcidentaj landoj la laboristo penas eliri el la marĉo laborplena en kiu estas neniu espero, kiu malfermas butikojn kiuj bankrotiĝas antaŭ ol la fino de iuj jaroj trapasas, same la indiĝenoj de Hindio emas eliri el la marĉo de tiu nova industrialismo.

La indiĝenoj uzas primitivajn ilojn kaj ilia produktaĵo popersone ne estas tiom granda kiom en okcidentaj landoj.

Tiuj, kiuj eltrovas siajn vivrimedojn pere de la terkulturo pligrandiĝas nombre rilate al la tuta loĝantaro. La ciferoj montras 61% en 1891 kreskis al 66% en 1901, al 71% en 1911 kaj al 73% en 1921. La pligrandiĝo estas pli ol la proporcia kresko de la loĝantaro.

Samtempe kreskas la nombro de proletoj ne posedantaj iun ajn propran teron.

Kompare kun aliaj landoj, la rikolto po akro estas malgranda.

Po akro semita oni akiris en Granda Britio 32 buŝelojn, en Kanado 22, en Usono 16 kaj en la Punjabo (distrikto ne norda Hindio) nur 13.

Komparo kun aliaj termasoj (antaŭmilite)

lando	Kulturita akraro en milionoj	akroj pokapo	loĝantaro en milion	manĝaj produktoj en milion tunoj
Usono	318,5	3,5	92	133
Rusio	278,6	1,7	163	121
Hindio	264,8	1,1	244	59

El la 33 urboj en Hindio, almenaŭ 22 ne okupiĝas en industriaj aŭ komercaj entreprenoj. Do Hindio ankoraŭ ne faris paŝon al urbiĝo.

Ni ekzamenu la nombron de ŝpiniloj 1921.

	En Hindio	Unuigita Reĝlando
teksiloj	123783	790399
ŝpiniloj	6870804	60053246

Pro la fakto, ke la loĝantoj en Hindio estas tiom multnombraj, oni kalkulas, ke Britio havas 318,2 ŝpinilojn kaj 17,8 teksilojn po mil loĝantoj dum en Hindio estas nur 21,7 ŝpiniloj kaj 0,35 teksiloj.

En Hindio estas nur 3 ĉefindustrioj, kiuj okupigas pli ol 2 cent mil laboristojn industrioj de kotono, juto, kaj karbo.

El 315 milionoj da loĝantoj 35 milionoj dependas de industrio; de ili 18 estas dependantoj de laboristoj, kiuj lasas 17 milionojn aktuale okupataj. De tiuj nur 8 cent miloj laboris kun maŝinŝpiniloj (poweo). Do pli ol 16 milionoj estas okupataj en malgrandskalaj industrioj. Estas okupataj en grandindustrio nur 1367136 laboristoj, kiuj estas nur $^1/_{245}$ de la loĝantaro. Tamen industrio tre rapide disvolviĝas kaj Hindio ŝanĝiĝas de terkultura al industria lando. Tio tre klare videbliĝas per la ciferoj por importoj kaj eksportoj. Dum la 30 jaroj antaŭ 1907, la fabrikitaj varoj okupis de la tuta importaro 65% en 1879; falis 57% en 1892 kaj al 53% en 1907/8: Kaj la proporcio de fabrikitaj varoj kompare kun la tuto, kiuj estis eksportitaj kreskis de 8% en 1879 ĝis 16% en 1892 kaj ĝis pli ol 22% en 1907/8.

Kotona fabrikado en Hindio en milionoj jardoj (1 jardo = 36 coloj):

Normo	Hindaj teksiloj	Per Hejm-teksiloj	Tuta Produkto	Japana Imp.	Tuta Imp.	Eksporto el Hindio
1911/14	1064	1284	2348	5,2	2819	85
1921/4	1719	933	2652	107,0	1319	164
1924/5	1970	1402	3372	145,0	1771	181

La enlandprodukto (3372) estas pli ol la tuta importo (1771). Rimarkinde Hindio ankaŭ eksportas (181).

La kondiĉoj de la Hindoj estas eĉ pli malbonaj ol tiuj de la pundomuloj laŭ la pezo de la viroj, certigita de la Komisiono por enketi pri la laboro en la Hindaj fabrikejoj.

		Pezo	
ĉe Bombajo	malliberuloj	112,12	funtoj
	teksistoj	104,81	„
	aliaj	102,01	„
ĉe Madraso	malliberuloj	114,38	„
	teksistoj	98,00	„
	aliaj	103,63	„

Tiom rapide Hindio industriiĝas, ke la Ligo de Nacioj agnoskas ĝin kiel unu de la 8 ŝtatoj de ĉefindustria graveco.

Se ni komparas la eksporton de krudaj materialoj kun tiu de fabrikitaj varoj, la proporcio montriĝas jene:

Valoro en milionoj de funtoj sterlingaj:

	1913/14	14/15	16/17	17/18	18/19
Krudaĵoj	81,6	53,4	67,1	55,2	50,1
Fabrikaĵoj	36,4	33,1	51,3	48,5	58,5

Procento al tuta eksporto:

	1913/14	14/15	16/17	17/18	18/19
Krudaĵoj	50.1	45,1	42,4	35,5	36,1
Fabrikaĵoj	22,4	26,2	32,5	31,2	36,6

La falo en la eksporto de krudaĵoj de 51,1% al 36,1% kaj la pliigo de la eksporto de fabrikitaĵoj de 22,4% al 36,6% de 1914 ĝis 1919 montras la gradon, en kiu la industriaj firmoj ricevis stimulon pro milito-stato.

La koton-teksaĵoj kiujn Lankaŝiro (Anglio) eksportas al Hindio en tiom grandaj kvantoj ne estas grave en danĝero pro konkurenco ĉe Hindio, ĉar oni fabrikis en Hindio ĝis nun, nur la malbonkvalitajn teksaĵojn, kiuj trovas bonan merkaton en sia propra lando.

Jen bildo de Hindio; la indiĝenoj malamegas grandindustrian enpuŝiĝon; kaj en la grandaj industrioj komencas organiziĝi en unuiĝoj por kontraŭstari la premegon de la industriaj magnatoj kun ilia eksterlanda financo. Ili kelkfoje eĉ strikis grandnombre. Tion kion la regnestro apenaŭ kuraĝas fari en siaj propraj landoj, ili ordonis en tiu nigrula lando — la senzorgan mortpafon de la strikantoj.

Sian sorton ili penos plibonigi, al la okcidentaj fratoj por kunhelpo kaj subteno (simpatie kaj mone) ili alvokas.

Ilian alvokon ni ne lasu senresponda.

Londono (3398).

Gravega reformo en Turkmenio

Nuntempe en Turkmenio efektiviĝas t. n. ter-akva reformo, kiu havas treege gravan signifon por la respubliko. Por kompreni neceson kaj ĝustecon de reformo bezonas halti je historio pri apero de agrikulturo en Turkmenio.

150 jaroj antaŭ nun turkmenoj-nomadoj, pelataj per moviĝantaj sablaroj, konkeris oazon ĉe siaj najbaroj, ĥivanoj, afganoj kaj persoj. Por konservi almilitaĵon de malamikaj najbaroj, turkmenoj ĉiujare redividas akvon kaj teron inter viroj, kapablaj levi glavon (sanaŝik'a rajto). Dank' al sukcesaj invadoj al najbaroj, vendado de virinoj kaj sklavoj, en auloj[1]) ekkreskis

[1]) aul'o-turkmena vilaĝo.

posedanta klaso. Dum sanaŝika rajto ĉi-klaso ne povas larĝigi siajn parcelojn kaj ĝi aspiras "edzan rajton". Edza rajto permesas ricevi teron kaj akvon ne al tiu, kiu estas kapabla preni glavon, sed al tiu, kiu havas eblecon por edziĝo. Jam tiam ekzistis granda "kalym", t. e. aĉeto kaj vendo de virinoj, tial edziĝi kaj ricevi akvon kaj teron povis nur posedantoj. Malriĉuloj restis sen akvo kaj tero.

Dum ĉi-momento Turkmenion venkas cara Rusio. Kvankam la metropolo el-premas ĉiujn sukojn el Turkmenio, mastrumado de la lasta ĉiam disvolviĝas kaj en aulo kreskas nova klaso — malgranda burĝaro.

Ĉi-burĝaron ne kontentigas edza rajto kaj ĝi aspiras "mjulk'an rajton", privatan heredeblan propraĵon.

Ĉi-tiu rajto donis al riĉuloj larĝan eblecon por ŝpari kaj koncentrigi en siaj manoj grandajn parcelojn, per malkara aĉeto de bankrotintaj malriĉaj deĥkanoj [1]). Ĉi parcelojn ili poste farmigis al malriĉuloj, kiuj ĝis 40—50 jara aĝo ne povis akiri propran teron (ŝparis monon por aĉeto de edzino).

Nunmomente ni observas en aulo ĉiujaran redividon de akvo kaj tero, intermitecon de parceloj, interaulan kaj gentan senegalecon, edzan kaj sanaŝikan rajton, kio treege malutilas al deĥkana mastrumado.

Ĉio ĉi-tio devigas efektivigi terakvan reformon. La lasta koncernos komercistojn, pastrojn, ne partoprenintojn en aula mastrumado aŭ brutedukado per sia persona laboro, riĉulojn, kiuj havas teron super normo, rusajn vilaĝanojn, kiuj ĝis nun uzas akvon multoble, ol aborigenoj. Mezriĉan mastrumon reformo ne tuŝos.

Kiel rezultato post la reformo Turkmenio disponos 22 563 desjatinoj da libera tero. Ĉi-tero estos distribuita inter kamparanoj, kiuj tute ne posedas aŭ posedas malgrandajn parcelojn. Ĉiu laborema mastrumejo ricevos de 1 1/2 ĝis 5 desjatinoj da tero sen diferenco de sekso kaj nacio.

Praktika efektivigo de la reformo komenciĝis, ĝi renkontas plenan helpon kaj simpation de 97 % loĝantaro. La reformo estos efektivigita kaj ĝi garantios al Turkmenio disvolviĝon de agrikulturo kaj kreskon de socia aktiveco en la aulo.

Trad. *S. Bojev, Poltorak, Turkmenio. (4358)*

[1]) deĥkan'o — turkmena kamparano.

Ponta disrompiĝo en Sirio

Kiel konate nun en Sirio la enloĝantoj ribelas kontraŭ la Francaj subpremantoj. Okazas similaj bataloj kiel en Maroko kaj Ĉinio. Laŭŝajne ankaŭ tie la ribelantoj estas sufiĉe fortaj por forpeli la eksterlandan kapitalistaron el la lando. En la nokto de la 3. novembro la ribelantoj eksplodigis fervojan ponton proksime de Damaskus, kiu gvidas al la grava haveno Haifa. Per tio la urbo Damaskus estas nun sen interligo kun la koncerna haveno.

EL ANGOLA

Malfeliĉe, la edukado de la infanoj ne tro multe *okupas la spiriton* de la gepatroj. Kiam ili atingas aĝon, en kiu ili povas produkti laboron, tiam la knaboj ĉesas manĝi kun la patrinoj kaj ekhelpas la patrojn ĉe la kampkulturoj aŭ en la ŝarĝotransportado. La filinoj estas instruataj de l'patrino pri la domservoj kaj pri la semado de l' kampoj.

La *Kibala* instruas la idojn laŭ 5 el la tielnomataj "ordonoj de la dileĝo": honori gepatrojn kaj parencojn, ne mortigi, ne ŝteli, ne mensogi kaj ne murmuri pri alies aferoj. La respekto por la maljunuloj ne estas absoluta, oni ne misagas kontraŭ ili, nek lasas ilin malsatmortiĝi — kiel estis uzo inter la pragentuloj —, sed, vere nur propraj parencoj ŝuldas respekton al ili kaj ilin nutras, kion faras la kunloĝantaro tiam, kiam tiuj parencoj malestas.

Proksime al la viraĝo, la knaboj estas iniciatataj pri la plenaĝula vivo. Kiam ili estas 12jaraj, laŭ la plej ĝenerala kutimo, aŭ de la 14. ĝis la 16. jaraĝo, kiel okazas inter la *Libolu*, la "kimbanda" prenas sur sin la taskon instrui ilin pri ĉio, kion viro devas koni de l'socia, samkiel de la seksa vivo.

Inter la *Ba-Sele*, la junuloj estas kondukataj de la "Kimbanda" en senloĝejan lokon kie ĉiuj bivakas kune kun 10 aŭ 12 jam iniciatitaj junuloj. Tie, preninte ŝtonon kiel sidejo, ili devas suferi la operacion de l' ĉirkaŭtranĉado farita per bone akrigita tranĉilo. La instruado okazas dum la kuraco. Dum ĉi-lasta ne estas anoncita, ĉia seksorilato estas malpermesata en la "libata" al ĉiu suferanto; sed tuj kiam ĝi fariĝas publika, la tuta loĝantaro sin preparas por feste akcepti la novajn operaciitojn. Ĉi-tiuj alvenas portante trabon surŝultre kaj, ĉirkaŭsekvataj de ĉiuj loĝantoj de la "libata" iras en la domon de la estro ("soba"), kie ili demetas sian ŝarĝon ricevante de li donace 4 metrojn da drapo. Grandajn potojn da "maluvu" (biero el maizo) ricevas ti-kiuj bivakis kun la suferintoj, kaj la "soba" tiam deklaras konsideri kiel virojn ĉiujn operaciitojn, kiuj rajtas hejmen returni en la plenuzeblo de ĉiuj plezuroj kaj rajtoj koncernantaj la virojn. Dum 4 tagoj, tiam regas orgio "batuk" en la tuta vilaĝo.

La *Ba-Nanu* el *Kasong* ne malpermesas la seksorilatojn dum la operacio. Plue, la ĉiikaŭtranĉitaj junuloj ne revenas kun trabo surŝultre, sed per "maŝila" [1]). La "soba" oferdonacas bovon por la festeno.

Inter la gento el *Amboim*, la ĉirkaŭtranĉado ne estas ĝenerala kutimo, sed tie, kie ĝi estas farata, la ceremonio komenciĝas per ekzerciĝo de la malbonaj spritaj ("kazumbi"), kiujn la "Kimbanda" *forigas* el la junuloj, tuŝante ilin per kokideto. Poste, en kaŝita parto de arbaro, kie serpentumas rivereto, li praktikas la doloriĝan operacion uzante la sukon de la bananarbo por haltigi la elfluantan sangon, kiu estas ricevata en trunkopecon de bananarbo pertranĉile kavigita. Dum unu monato — tiom, kiom daŭras la kuracado kaj iniciato — ne estas permesate al virinoj, preterpasi tiun lokon kaj ankaŭ estas malpermesate al la "soba" foriri el sia "libata". La suferantoj ne povas manĝi flugilojn aŭ kapojn de birdoj, nek la felojn kaj kapojn de ratoj, kiujn ili devas kunporti returnonte al la "libata" por demeti ilin sur arbo tuj kiam ili atingas la unuan vojkruciĝon. Al "soba" ili alportas lignofaskon kaj trapikilon de ratoj, kaj tiam komenciĝas la festo, per kiu la ceremonio finiĝas.

Inter ĉiuj ceteraj gentoj la iniciato sekvas proksimume la saman riton: la soleco, la enmiksiĝo de la "Kimbanda" kiel operacianto, la lernado de l'seksofunkcio kaj la reveno en la "libata"n inter festelmontroj. La junulo ricevas tiam la rajton ĝuadi ĉian liberecon kaj elekti kunulinon. Kaj ĉu li edziĝas, aŭ li sindetenas pri konstituo de familio (kio tamen estas maloftega), — la vivo de la indiĝeno, se la postuloj de la "civilizigo" ne farus el li la senrajtan sklavon, kiu li ja estas, pasus sen pluo da priokupoj ĝis la morto.

J. P. B.

[1]) Transportilo por personoj, tre uzata en Angola, kaj konsistanta el speco de hamako pendanta de longa trabo, surŝultreportata de du nigruloj.

Sankteco de la posedo

Ĵus antaŭ ol li mortis, Fred Bramley ĉe kongreso de la Brita sindikataro aprobis unuecon inter ĉiulandaj sindikatoj. Defendante Sovetlandon li imprese deklaris: "La rusa eksperimento kaj ĝiaj sekvoj elpruvis gravan fakton. Ŝajnas, ke nacio povas fortranĉi la kapojn de reĝoj; oni povas forigi reĝajn familiojn kaj malliberigi la imperiestrojn — kiel farite en Aŭstrio kaj Germanio. Nacio povas antaŭenpuŝi mondmiliton el kiu venas universala detruego kaj buĉado kaj poste tiu nacio povas esti pardonita kaj bonvenita en la naciaron. Vi povas ŝanĝi politikajn instituciojn laŭvole kaj ĉio fartas bone. Sed se vi maltrankviligus la bienprofiton kaj fordetruus la ekspluaton de la salajrlaboristo kaj forĵetus la privilegion, povon kaj posedaĵon ĝuitajn de la malplimulto, tiam kontraŭos vin, kio nun kontraŭas Sovetlandon — izoligo, bojkoto kaj internacia persekuto".

Alilanduloj en Britio.

London 10. oktobro 1925. Laŭ la ĵurnalo "Daily Telegraph" svisa frizisto nomata A. Hilpert, kiu ricevis permeson de britaj aŭtoritatoj veni kaj resti en Anglio dum tri monatoj por studi anglan lingvon en Londono, estis kondamnita je monpuno de £ 20 kaj elpelo el la lando, ĉar li akceptis oficon kiel help-frizisto en salono por sinjorinoj, kontraŭ la promesoj donitaj al aŭtoritatoj nur studi la lingvon.

(1053)

Burĝeca ekonomio

Cigaredfabriko devis pagi por unu miliono da cigaredoj la novan banderolimposton de 5000 markoj je la 1. okt. Ĉar la cigaredoj estis de malmultekosta kvalito, la firmo malgajnus, se ĝi pagus la imposton. Ĝi bonvolis donaci la cigaredojn al la regnaj militistoj, policaro (Sipo), senlaboruloj kaj militkripluloj, kaj ĝi farls proponojn konformajn al la Karlsruh'a imposta instanco. Tiu malaprobis kaj persistis je pago de la impostoj, aŭ detruo de la cigaredoj. Ĉar la firmo ne pagis, estis bruligitaj la cigaredoj. Por ke ne estu detruata nur 999999 da ili, tri oficistoj devis nombri la kvanton, ĝis tuta miliono. Poste oni pakis la cigaredojn sur veturilojn kaj veturis ilin en fabrikon, kie ili estis bruligitaj en tri grandaj fornoj dume du oficistoj apudstaris.

Tiele okazis en la jaro de la "Savo" 1925 sub la regado de la burĝara bloko de la regna prezidanto "von Hindenburg". La germana popolo vere povas esti fiera je siaj "savantoj". *3553*

Dibocado de milionulo en Liepaja

Pri finna riĉulo, kiu en Liepaja dum unu vespero malŝparis pli ol 20000 latojn [1]) oni informas nin: la malavara riĉulo estas unu el akciposedantoj de fabriko "Pluton" en Liepaja kaj posedas multajn fabrikojn ankaŭ en Finnlando. Ĉiuaŭtune kun multnombra servistaro li vizitas urbon Liepaja por partopreni jarkunvenon de akciposedantoj. Pasintjare la sama riĉulo donacis al urba fajrobrigado 1200 latojn por renovigo de ĝia inventaro. Pro tio la brigado nomis lin honora membro kaj aranĝis je lia honoro torĉmanifestadon kaj aklamon. Ĉi-jare al li estas aranĝita festeno kaj prezentitaj kelkaj honorsignoj. La finno respondis per abunda vespermanĝo en luksa hotelo, dum kiu li denove donacis al fajrobrigado ĉekon je 2600 latoj. Al sia konstanta frizisto la malavarulo donacis 1140 latojn. Ankaŭ hotelaj lakeoj, ŝoforoj kaj kelnerinoj estas malavare donacitaj. Sed plej reĝmaniere estas donacita kelnerino J., ĉe kiu li loĝis dum sia restado. Forveturante li ordonis al hotelestro doni je lia konto al siaj akompanantoj ĉion kion ili postulos.

El latva gazeto "Jaŭnakas Zinar".

Karaj kamaradoj! Similaj dibocadoj de grasiĝantaj "malavaruloj" certe estas la plej kutima kaj ĉiutaga afero kaj ni devus malatenti ilin. Sed ne forgesu, ke dibocŭlo estas "civitano" de "libera, sendependa, demokratia" ŝtato, kiu ankoraŭ suferas pro militsekvoj. La sama "malavarulo" luktos kontraŭ plialtigo de laborpago eĉ je centimo — oni ja devas streĉi ĉiujn fortojn por restarigi nacian industrion ktp.

"Ĉion al patrujo!" — jen alia krio.

"Ĉion de patrujo!" — jen ilia agado.

En nomo de tiu-ĉi sankta, por malavaraj dibocŭloj, patrujo finna laboristaro mortis en malliberejo kaj vicoj de "popola" armeo. En nomo de l' sama patrujo finna kaj ankaŭ tutmonda laboristaro ĝis nun suferas pro senlaboreco kaj mizera laborpago por restarigi sian katenanton — nacian monstron de kapitalo — sanktan patrujon.

Jen, kial mi opinias ĉi-supran tradukon tute konvenan por konatigi ĝin al laboristaro, precipe al tiu de novaj, demokratiaj ŝtatoj, al kiu plej grave minacas danĝero esti venenitaj per naci-ŝovinismo. *Nemo.*

[1]) 1 lato = 1 fr. svisa.

SCIENCA KRONIKO

Sub tiu ĉi rubriko estus tre signifa ricevi materialon el ĉiuj partoj de l' mondo. *Red.*

Sciigoj el meza Azio

1. Inter Irkutsk kaj Aldansk (orserĉejo en norda Sibirio) oni konstruas telegrafan linion. Ĝi estos finita en decembro de nuna jaro. Pli frue interkomunikado okazis nur per ĉevaloj, kameloj aŭ per akvovojo.

2. En urbo Bodajbo (norda Sibirio) orserĉistoj entuziasmigitaj pro flugveno de unua aeroplano donis al aviadkomitato tagan orakiraĵon, kiu estas taksata je 18000 rubloj (9000 amerikaj dolaroj).

3. Tra Irkutsk iras multaj maŝinoj por orejoj de Aldana regiono (norda Sibirio). Ekfunkciis anglo-amerika kompanio. Dum sekvanta jaro ĝi planas liveri ĉirkaŭ 7200 kilogr. da oro.

4. Proksime de Irkutsk (6 kilometroj) oni elfosis ostojn de prahistoria bovo. La ostoj estas liveritaj en Irkutskan muzeon kaj estas tre valora scienca trovaĵo.

5. Dum nuna aŭtuno oni intencas konstrui en Irkutsk fortegan Radiodisaŭdigilon. Ĝenerale en SSSR nun estas konstruataj multaj radiostacioj. *K. Polušin.*

Sciigoj el ekstrema oriento

1. Vladivostokan havenon oni plilarĝigas. Multe da homoj laboras. Ankaŭ en Vladivostok oni konstruas naftbazon por liveri petrolon al tuta orienta Sibirio kaj al Ĉinio ĝis urbo Kanton.

2. 31. aŭgusto en Vladivostokon venis grupo de industriistoj el norda Japanio kun inspektoro de ĉiuj Ĥokkaidaj fabrikejoj. La Japanoj vizitis orientan parton de SSSR por studi industrion tiean. Ili same vizitis Irkutskon kaj bone salutitaj de loka estraro forveturis hejmen.

3. En fino de septembro Vladivostokon vizitis japanaj studantoj por konatiĝi kun SSSR. Vivu solidareco de ĉiuj rasoj!

4. 9. septembro, nokte, granda ventego okazinta, dronigis multe da ŝarĝŝipetoj en haveno de Vladivostok. Ĝi detruis fervojon kaj kaŭzis grandan malprofiton al loĝantaro. Multe da homoj dronis.

5. En Blagoveŝĉenska regiono (ĉe rivero Amur) trans rivero Selemĝa, kiu fluas en Amuron migras multe da sciuroj. Pasa ĝeroj de vaporŝipoj kaptas la sciurojn po dekoj per nearmitaj manoj. Rikolto de cedronuksoj (nutraĵo de sciuroj) en nuna jaro estas bona en tuta Sibirio kaj same bona devas esti "rikolto" de sciuroj. Sola Irkutska gubernio ĉiujare donas po 2500000 da sciurfeloj el sia praarbaro-maro.

K. Polušin.

Sciigoj el Sibirio

1. Valora scienca trovaĵo

Proksime de Irkutsk oni trovis ostojn de antikva besto mamuto. Oni daŭrigas elfosojn. Universitato de Irkutsk havas lertajn paleontologojn. En norda Sibirio mamutostoj estas pli multaj. En Jakutio ekzistas eĉ speciala industrio de diversaj bagateloj el dentostoj de mamuto (skatoletoj, papertranĉiloj ktp.).

2. Vulkano vekiĝas ĉe lago Bajkal

Sur bordregiono de lago Bajkal kalka supro de Bajkalaj montoj, nomata "Belaja" (Blanka) jam multe da jaroj atentigas la geologojn kaj lokajn loĝantojn.

Faritaj esploroj de geologoj konstatis, ke la supro "Belaja" estas estingiĝinta vulkano. Truo de la vulkano estas superŝutita de rompopecoj montaj mineraloj, precipe de kalkaj.

En nuna jaro la supro "Belaja" allogis apartan atenton de la geologoj kaj de loka loĝantaro. Lokaj vilaĝanoj estas atestantoj de jenaj fenomenoj periode observataj: la supro "Belaja" fumas kaj la procedo estas akompanata de la subtera obtuza bruo. Sendube la supro "Belaja" estas pinto de la vulkano. Lago Bajkal estas plej granda en la mondo sensala akvujo tre profunda (1400 metr.). Geologoj certigas, ke la lago estas kavego kaŭzata de iama katastrofo de tertremo. *Petro Panasjuk.*

Baloto en Ĉekoslovakio

La plej verŝajna okupo en la parlamento laŭ ĝisnunaj rezultatoj, formiĝos, jene:

Ĉek. agraruloj	45	(42)
Komunistoj	42	(27)
Ĉek. popolpartio	31	(21)
Ĉek. soc. dem.	29	(52)
Ĉek. nac. soc.	28	(27)
Germ. partio agrarula asoc. .	24	(13)
Slovak. popolpartio	23	(11)
Germ. soc. dem.	18	(30)
Nac. dem. (D-ro Kramarsch) .	13	(22)
Ĉek. met. partio	13	(6)
Germ. krist.-soc. partio . . .	12	(9)
Germ. nac. partio	10	(10)
Germ. nac.-soc.	6	(5)
Hungar. krist.-soc.	4	(4)
Pol. partio	1	(—)
Agrarula partio	1	(—)

Kune 300 mandatoj. Laŭ tio la koaliciaj partioj inkluzive de l' ĉek. met. partio kunigos 159 mandatojn, dum la opozicio disponas 141. La germ. kaj hungaraj partioj atingos verŝajne 74 mandatojn kontraŭ 78 en jaro 1920.

≡ DISKUTEJO ≡

Je "Kiu devas eduki infanojn?"

(Senn. n-o 1 [53])

La laborista korespondanto tre plendas, ke li ne povas ĉiudujare havigi al si freŝan edzineton. Eble lia stato estas bedaŭrinda, sed tamen ĝi ne estas tiom terura, kiom li ŝajnigas. La ŝtato ne povas protekti degeneremulojn, same ĝi ne povas preni sur sin la edukadon de l' infanaro, kiun sennombre produktados al ĝi amatoroj de freŝaj edzinoj. Des pli ke ĝis nun Soveta registaro, malgraŭ siaj penoj ne sukcesis likvidi infanan senhejmecon. La ĉi-subaj linioj pruvas, ke estas ŝtatanoj, kiuj pro veraj interesoj de l' ŝtato intencas eĉ pli "sklavigi" la viron — kies staton tiom priploras la korespondanto.

Kion oni nomu geedziĝo?

(Interparolo kun la popol-komisaro por internaj aferoj, k-do *Beloborodov*)

— "Mi ne povas konsenti kun la opinio eldirita de komisaro por juro — k-do Kurskij en lia raporto antaŭ la konferenco de Ekzekutiva komitato. Ni ne povas nomi la rilatojn inter viro kaj virino geedzecaj, se ili kuniĝas nur por seksa kunvivado. Tial por difinado de geedzeco necesas diri, kiaj do interrilatoj estas karakterizataj kiel geedzecaj. Se ĉi-difino mankos en la leĝo tiam povas okazi, ke en diversaj lokoj oni diversmaniere traktos geedzecon. Foresto de difino de geedzeco rezultigos rifuzon de la tribunalo puni multedzinecon, dum laŭ la kriminala kodo poligamio estas punenda. La ŝtato ne povas rilati indiferente al la faktoj: ĉu la geedziĝo estos longedaŭra aŭ male; ĉu ĝi ofte estos interrompata aŭ male.

Jen, kial — finparolis k-do Beloborodov — mi opinias, ke ne ĉia kunvivado estas taksebla de niaj leĝoj, kiel geedziĝo. Tio-ĉi estos eraro. En la leĝo devas esti klare formulite kio estas geedziĝo, pro la devo de l' ŝtato akceladi al ekzistado de firma familio: — pro interesoj de virino — fakte pli malforta familiparto, kaj pro interesoj de l' infanoj kaj la ŝtato mem."

(El Ruĝa gazeto-vespera n-o 258, 23. okt.)

Sed por konsoli la kamaradon kiu bedaŭras la malliberecon de viro en liaj amaj aferoj, mi atentigas lin al la artikolo: "Prostituado en Leningrado". Supozeble ke Moskvo ne "malprogresas ĉi-rilate kompare kun L-grado! *SAT-ano.*

KORESPONDEJO

P. Kirjuŝin. Bedaŭrinde "Ĉe landlimo" alvenis, post kiam "Krio de netolerebla doloro" jam estis kompostita. Ĝi lasta koincidas kun la via kaj aperis.

224. Korespondanoncojn ni presigas nur post antaŭa pago. Tarifon vidu en "Senn".

K-do. H. Wirz. Dankon, similan art. ni jam ricevis.

Pri neaperigitaj artikoloj. Laŭ la disponita, de k-do E. Lanty, materialo, la Redakci-Komisiono konstatas, ke ĉi artikoloj rilatas precipe al la redakci-periodo de k-do E. Lanty. La Red.-Kom. kontrolis kaj rezulte konstatas, ke:

anarkist-tendencaj	=	2 artikoloj
komunist „ „	=	5 „
soc.-dem. „ „	=	— „
polemikaj	=	2 „
tro ampleksaj	=	kelkaj artikoloj

ne aperis precipe pro troa unuflanka parti-tendenco.

Plue estas parto de artikoloj ne presitaj de ĝisnuna redaktoro k-do Barthelmess. Parte ili ne taŭgis por "Senn." aŭ entute nenion, parte la enpresigo de ili ne estas nepre postulita de la sendintoj, (tio koncernas ĉiujn krom polemikaj kaj ne plu aktualaj aŭ tro ampleksaj).

La komisiono neniel riproĉas, male, aprobas la neaperigon de la koncernaj artikoloj.

Ni esperu, ke estonte tia raporto ne plu necesas, ĉar la Red.-Kom., kiu konsistas el anoj de l' diversaj parti-tendencoj, rezervu por si la rajton juĝi pri uzo aŭ neuzo de manuskriptoj. Ni presigos laŭeble ĉiun taŭgaĵon, kaj pri netaŭgeco de ies laboro ni sciigas per "Senn." en la rubriko "Korespondejo". Ti-kiu deziras revicevi sian manuskripton neuzindan bonvolu enmeti la afrankon. *Red.-Kom.*

Tra la historia Limo

Sokolov

(Ekonomia kaj politika situacio de meza Azio en estinto kaj estonto.)

Per gazeta artikolo estas malfacile pritrakti ĉiujn diversajn materialojn por karakterizigo de la temo, krom tio prenante atenton pri manko de eŭropa literaturo pri tiu ĉi demando. Meza Azio travivas kaj travivis tro multe da plej diversaj perfidoj politikaj kaj ekonomiaj tra ĝia historia vojo. De XII jarcento ĝis nia epoko, meza Azio jam estis senpaŭze areno por batalo de popoloj, trans ĝi trapaŝadis preskaŭ ĉiaj grandegaj transmigroj de popoloj de sudo kaj oriento al okcidento kaj de nordo al sudo. Tial, tie ĉi estadis kaj persa vekinto Kir (V. jarcento ĝis n. ep.), kaj araboj, kreantaj tie ĉi florantan Ĥalifaton (633 jaro de n. ep.), poste de nordo enpenetris tjurkoj, prapatroj de nuntempaj turkoj selĝukoj (VIII. jarcento de n. ep.), Ĉingis-Ĥan (XII. jarcento), uzbekoj (XVI. jarcento), ĉinoj, kijĉakoj — gento simila estintaj rusaj "polovci" ktp. Se ni konsideras, ke persoj enpenetris en V. jarcento ĝis nia epoko, tiam tuta meza Azio en plena vico de jarcentoj servis kiel trairejo por senpaŭza irado de tjurkaj masoj, trans Altajo kaj norda parto de meza Azio direktirantaj al Maverranag (Fergano, nuntempa Samarkand) kaj Persio. Civilizacio de tia meza Azio jam estis sufiĉe granda, kvankvam ĝi ne disvolviĝis sub ekbatoj de militemuloj. Jam en VIII. ĝis X. jarcento oni fabrikis paperan ŝtofon, estis alta metala industrio, oni preparis ĉifan paperon. Fine, en IX. jarcento enpenetris tien ĉi rusoj, trovante vojojn al Hindio. Tra malkvieta dinamika historio de meza Azio kunigis popoloj sur malgranda plato de uzebla por vivo tero kontraŭaj laŭ civilizadoj kaj politikaj statoj, naskigis tute kontraŭaj politikaj interesoj kaj faris politikajn malamikecojn. Sur tia same malgranda peco da tero loĝantoj parolas per 22 lingvoj kaj apartigitaj per grandaj specoj de maluzebla nun por vivo tero, oni vivas per diversa ekonomia vivo — de genta — migreco ĝis kapitalistema. Post la Soveta Revolucio tiuj ĉi kontraŭecoj devis esti forigitaj kaj bazigante sur tiaj mirindaj senordigitaj interrilatoj, devis esti konstruanta politikon de Soveta lando kaj laŭ ĝi, staranta je gardo juron de proletaro premigita, estis povanta efektivigi ilian liberan per Regna — Nacia Dislimigo. Sanga batalado de nacioj, ĝenerala nacia tranĉo inter ili, akompaninta la civilizigatan politikon de Rusa carismo, estis foririnta al legendotempoj de malbenita epoko. Kunigitaj politike kaj ekonomie per sola Soveta Unuiĝo, sin apogante je helpo de industri-progresema proletaro, postcivilizadaj popoloj de meza Azio aliradas sur larĝa ebena vojo de tutmonda batalo por komunismo. Oktobra Revolucio vekis konscion de popoloj orientaj. Do dislimigitaj Respublikoj de meza Azio havas kaj centradministre kaj loke ilian oportunan nacian sovetan registaron, ili laboras, parolas, skribas per sia nacia lingvo, lernadas, interligas kaj fortigas spirite kaj mastraĵe. Rolo de eŭropanoj kiel estas poste la nacia mempotencigo de popoloj. Ĉu enmiksas eŭropano al laboro de enlanda loĝantaro? Tute ne. Sed enlanda loĝantaro ankaŭ malmulte sufiĉas propre labori. Proletara solidareco helpas por konstruo novan, liberan vivon, post multaĝa sklavo kaj per orientaj despotoj kaj civilizaj eŭropanoj. Kaj laŭ fundamento de tia situacio oni preparigas nun por proprepotenca laboro multajn enlandanojn, en respublikoj jam estas multe da enlandanoj laborantaj respondecegan oficon, sed oni preparigas specialistojn, por plena uzo de produktema forto de enlandaj masoj — por fortigi ilian ekonomian situacion. Naci-regna dislimigo, konstruante normalan politikon por laboreca komunigo de popoloj, kondukis al forta ekonomia pliestado. Meza Azio, enhavanta areon $2^1/_2$ oble plian ol Germanio, ĝis milito de 14 jaro, havas ne multe por uzeblaj por agrikulturo areoj. Preskaŭ $^1/_3$ de tuta areo estas okupata per sabla dezerto, granda parto — senakva stepo, nur printempe taŭga por brutedukado, kaj tute malgranda parto de akvumata tero. (Daŭrigota)

KRONIKO

Belgio

Bruxelles. 4 kursoj en lernejoj malfermiĝis kaj en ejo de Sindikato de Konstrulaboristoj. Sume: 62 lernantoj kaj 20 por kurso per korespondado.

Francio

SAT-ano 155

Lyon. Meze de oktobro, estis malfermitaj de Esp. Lab. Grupo 3 kursoj gvidataj de k-dino Monteil, k-doj Chaussade kaj Roux. Je la kvara leciono jenajn rezultojn ni konstatis: Ilin partoprenas respektive: 9, 13 kaj 18 gelernantoj, sume 40. Tio esperigas bonan SAT-rikolton en 1926!

Sovet-Unio

Ŝaĥty. Estimataj gekamaradoj! En nia urbo, kiu estas distrikta centro, kaj grava laborista punkto pro apudaj karbminejoj, nun estas esperanta movado. Dank' al fervora samideano K. Skoropupov, kaj reprezentantoj de oficistoj de financoficejo, k-doj Teplinskij kaj Mironov, "Mestkomo" (Loka Komitato) aranĝis esperantajn kursojn, kiujn partoprenas pli ol 30 personoj. — Ni sendas saluton al niaj kamaradoj alilandaj kaj petas ilin sendi materialon por perfektiĝo kaj praktikado: ĵurnalojn, librojn, afiŝojn, alvokojn ktp., precipe pri laborista movado. Ankaŭ ni serĉas korespondantojn el ĉiuj landoj. Adreso: *Ŝaĥty* (Donsk.), Sovet-Unio. Okrfinotdel, Esperanto.

La Mestkomo.

Sebastopolo. La 18. oktobro okazis 1. Krimea Esp. Konferenco kiu unuan fojon resumis la esp-istan laboron en Krimea Respubliko kaj kreis konstantan esp. centron sub nomo "Centra Krimea Oficejo de SEU" kun sidloko en Sebastopolo.

Poste Krimeo multege eksuferis pro malsatego kaj sunklare estas, ke kultura laboro ne povis stari dum ĉi-jaroj sur kontentiga ŝtupo, ankaŭ la laboro esperantista.

Unuaj ĝermoj videbliĝis nur de la komenco de 1923 j. sed ekz. en la plej granda kaj industria urbo Sebastopolo la esp. laboro komenciĝis el nenio nur en la mezo de 1924 j.

La okazinta konferenco kiun partoprenis reprezentantoj de ĉiuj urboj en Krimeo montris la vivoplenan bildon de ĉiam kreskanta kaj leviĝanta ondo de prolet. esp. movado, kies granda manko estis tamen la diseco de fortoj kaj deŝireco de eksterlando. Loĝantaro en Krimeo estas ekstreme miksita, kio ankaŭ malhelpas al laboro.

Lokaj raportoj montris grandan intereson de la larĝaj laboristaj kaj vilaĝanaj amasoj al Esp. Ekz. en Sebastopolo, en la mezo de 1924 j. estis observataj, ke ĉiuj membroj de kluboj estis okupitaj per Esp. kaj najbaraj politik-sciencaj kursoj estadis malbone vizitataj. Tio igis iom malmultigi la nombron de ĉeloj kaj ĉiumezure firmiĝi sur atingita nivelo. Kelkloke en Krimeo esp. movado naskiĝadis nur pro iniciato de Partia komitato.

El lastaj atingaĵoj de Esp. en Krimeo estas interesaj:

1. La supera Krimea profesi-sindikata organo decidis anstataŭigi la lernadon de tatara lingvo en kluboj per Esperanto.

Sebastopola komitato de Societo de Radio-amikoj (kiu samtempe estas tutkrimea) decidis malfermi kursojn de Esp. por siaj membroj.

En kelkaj urboj, fakoj de popolklerigado, decidis enkonduki en kelkajn lernejojn Esp. kiel provo.

La konferenco decidis: aprobi plene la rezoluciojn de 2. kongreso de SEU kaj baze de tio.

2. Rifuzi iaman apartecon de esp. laboro, esp-istoj kiam kuniris en propa rondo, penis havi siajn apartajn kunvenejojn, apartajn esp. murgazetojn ktp. 1. Kr. konferenco proponis al ĉiu esp-isto eniri en ĉiujn branĉojn de kultur-laboro, esperantigi ĉiujn rondetojn, murgazetojn ktp.

3. Proponi al ĉiuj lokaj organizaĵoj rekonstruiĝi laŭ ĉelmetodo organizinte vivkapablajn kaj agemajn ĉelojn ĉe industriejoj, institucioj, soci-organizejoj ktp.

4. Rifuzi bruajn metodojn de agitpropagando por Esperanto kaj anstataŭigi ilin per praktika aplikado de Esp. kaj per laboro *per Esp.*, kunligante la laboristaron de Krimeo kun laboristaro de eksterlando.

5. Proponi al ĉiuj esp. aktivuloj de Krimeo eniri en SAT.

La novelektita Krimea Centra Oficejo komencis gvidi laŭplane la laboron en tutkrimea skalo kaj dissendis la unuan cirkuleron por vintra laboro.

CKO starigis interrilatojn kun ĉiuj respublikaj organizaĵoj de Sovetio kaj nun komencas starigi la interrilatojn kun eksterlando kaj petas ĉiujn laboristajn esp. organizaĵojn starigi konstantajn interrilatojn por interŝanĝo laŭ spertoj. Krome estas kreita Centra Krimea Korespondoficejo por praktika aplikado de Esp. kaj interligo de la tutmonda proletaro.

Tiucele, C. Kr. Korespond-Oficejo petas ĉiuspecajn laboristajn organizaĵojn, instituciojn, industriejojn, kooperativojn kaj apartajn personojn sendi al ĉi leterojn kaj adresojn de dezirantoj. Ni garantias tujan respondon. Adreso de Centra Krimea Oficejo kaj de C. Kr. Korespond-Oficejo estas jena: Sovetio, Krimeo, Sebastopolo, Dvorec Truda, komu. n-ro 21 al k-do B. Ŝaber.

Kelkaj el niaj oficuloj dubas pri ebleco kunligiĝi per Esp. Por tio ni dezirus havi interligojn aparte kun landoj, kie nun regas blanka teroro. Se estas kompromiteble sendi leterojn senpere el tiu lando al Sovetio, sendu ilin pere de ia alilanda esp-ista laborista organizaĵo.

Ni atendas viajn komunikaĵojn.

SAT-ano 5503

Esperanto kaj la I. F. T. U.

La Ekzekutivo de SAT (per 488) sendis al ĉiu Internacio (sindikata kaj politika) specialan alvokon kun n-o 2 de "Senn." Jen respondo de J. Sassenbach, Sekt. de la I. F. T. U. "Pri Esperanto ni nun enketas, ĉu ni rekomendas, ke niaj anoj alprenu ĝin. La konkludoj aperos en nia Pres-Raporto." Sindikatanoj agu tuj.

Mallongaj esp. novaĵoj

Inter scienculoj. Dum la okazinta antaŭnelonge en Londono internacia kongreso de radiologoj al la kongreso estis prezentita de kataluna radiologo Bremen-Masgrau esperantlingva raporto pri fak-scienca temo. Krome kelkaj partoprenantoj de la kongreso, profesoroj el Germanio, Sovetio, Hispanio, Argentino kaj aliaj, prezentis al la kongreskomitato deklaron, ke dum la sekvonta kongreso Esperanto estu allasita kiel oficiala kongresa helplingvo kaj ke ĉiuj kongresdokumentoj estu presataj ankaŭ en Esperanto.

Esperanto kaj teknika gazetaro. Okazinta lastatempe en Parizo la unua internacia kongreso de teknika gazetaro adoptis Esperanton kiel oficialan lingvon de siaj kongresoj kaj rekomendis uzadon de Esperanto por mallongaj resumoj de la artikoloj, presataj en teknikaj gazetoj.

Komercĉambroj kaj Esperanto. Komerca ĉambro de Parizo komencis praktike uzi Esperanton en siaj oficialaj dokumentoj, nome siajn certigo-dokumentojn pri la kvalito de eksportata varo ĝi donas kun paralela dulingva teksto — franca kaj esperanta.

Radio-Fako de Moskva Gubernia Konsilantaro de Profesiaj Unuiĝoj informas tutmondajn laboristajn radioamatorojn, ke de nun ĝi uzos por oficialaj interrilatoj pri Radio-amatora movado — Internacian Lingvon Esperanto.

Bonvolu peni represi tiun ĉi sciigon en diversajn naciajn radioĵurnalojn kaj taggazetojn kaj la specimenojn kun la teksto de tiu ĉi informo sendi al ni laŭ adreso:

"Rusio. Moskvo. Bolŝaja Dmitrovka Dom Sojuzov. Radio stacio de M. G. S. P. S. al Ĉef-inĝeniero A. V. Vinogradov."

Responde al alvoko de la Ekzekutivo de SAT la ĉefsekretario de la Internacia Federacio de Ĉapelfaristoj, k-do Ettore Reina skribis (30. 10. 25): — Kompreneble ni laŭeble enkondukas Esp. kiel interrilatilon. Sed ĝis nun ĝi ne sufiĉe disvastiĝas por ke ni korespondu per ĝi. Tamen ni aŭdis pri laboro de Esperantistoj en Germanio kaj ni helpos la disvastigon de la internacia lingvo. Laŭ propono nia la Itala Federacio fondos en Monza Kurson kaj mi mem penos ĉeesti."

PRESEJO: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG (GERMANIO)